



aktuala

35-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkredo 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Eltiro 200 ekzempleroj. In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.leadhoster.com; esperanto.net; esperanto.be; e.r.n.u.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Arie Bouman pri liaj spertoj en publikaj transportiloj
- Paĝo 5 - Aloisiso Sartorato pri Paulo Coelho; Vizitu zinkminejon
- Paĝo 6 - Programo de Amikejo Senlime en Kelmis La Calamine
- Paĝo 7 - Rubem Braga mesaĝas al sinjoro 903
- Paĝo 8 - Pri Pola Radio; Serafim Marques pri kredo estas savo
- Paĝo 9 - Jacob Hasbun tradukis Araban Noveleton 15
- Paĝo 10 - La Luzidoj de Luiz Vaz de Camoens
- Paĝo 11 - Poemaro de Alberto Garcia Orive kaj de Leite Junior
- Paĝo 12 - Sylla Magalhães Chaves estis elstara esperantisto
- Paĝo 13 - Bataloj intermonaĥaj grekaj kaj armenaj en Sankta Tero
- Paĝo 14 - Atilio Orellana Rojas leteras Liberan Folion
- Paĝo 16 - Keetlaer proverbas kaj Witdoeckt festas Ostendon
- Paĝo 17 - Paulo S. Viana pri la sen egala Leonardo da Vinci

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Junio 2010

- 2 Semajna kunveno
- 9 Bernard-Regis Larue pri ĉu la ĉielo falos sur niajn kapojn (*anstataŭ 23-06*)
- 16 Semajna kunveno
- 23 Vespermanĝo finlernajara en kutima restoracio Rugantino (*18h30 tie surloke*)
- 30 grupo ferias kaj ankaŭ en Julio kaj Aŭgusto kaj duono de Septembro

Septembro 2010

- 15 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 22 Bernard-Regis Larue pri astronomio (*konfirmenda*)
- 29 Semajna kunveno

MIAJ SPERTOJ PRI PUBLIKAJ TRANSPORTILOJ...

Kiam mi kaj mia edzino decidis partopreni al la kongreso REK 26 en Sankt Peterburgo kaj postkongreso en Moskvo (majo/junio 2010), ni devis demandi la vizon por eniri en Ruslando. Ni loĝas jam de kelkaj jaroj en Portiragnes (34), suda parto de Francio kaj demandis al nia amiko Jean Hénin, kiamaniere ni povus akiri la vizon. Li kiel organizanto de internaciaj vojaĝoj ankaŭ por esperantistoj, povus bone informi nin. Li rekomendis agentejon en Parizo kiu intervenos por akiri tion ĉe la konsulejo de Ruslando.

Kiel nederlandlingvano de origine, mi informis min ankaŭ en Bruselo (B) kie oni informis min eĉ en mia propra lingvo. Pro tio mi decidis peti la vizon en Belgio, ankaŭ forflugi ek de tie, ĉar Parizo (malgraŭ ke ĉiu vojo en Francio kondukas al Parizo) situas preskaŭ 800 km de Portiragnes. Ni veturis al Belgio al nia libertempoloko sufiĉe frue por persone peti tiun vizon. Sufiĉe komplika afero. Ne nur formularon, ankaŭ pasfoton, invitleteron de organizantoj, specialan asekuron nur por Ruslando ni bezonis. En Belgio mi havas la avantaĝon kiel +65 jaraĝulo uzi la trajnon malmultkosta kaj kun abono eĉ senpage la busojn, tramojn kaj metroojn.

La Rusa Konsulejo en Bruselo estas nur malfermita 3 tagoj en la semajno de la 9.30a ĝis la 12.30a horo kaj troviĝas proksimume nur 140 km de mia loĝejo en Knokke-Heist (marborde de Belgio). Laŭ retaj informoj estos por akiri Rusan vizon ĉe konsulejo en Bruselo, longa vico

ekstere kaj oni fermos la enirejon strikte je la 12.30a horo!

Kiel kutime propraaŭtoveturanto, mi volus testi nun la publikajn transportilojn. Mi ne volis riski alveni tro malfrue, do foriris el Knokke-Heist je la 6.30a horo. Certe tro frue mi alvenis al la stacidomo de Knokke-Heist. Post 1h45min. mi alvenis en Norda stacidomo de Bruselo, mi devis ŝanĝi de trajno sur alia kajo al Schumanstacidomo.

Por esti certa ke mi alvenos sur la bona kajo, mi malsupreniris kaj rigardis sur paneloj por trovi la bonan kajon, tuj mi denove supreniris la stuparon kaj rimarkis la vagonaron kun fermitaj pordoj!

Laŭ iu trajnoficisto mi estis tro malfrue, ili ĵus fermis la pordojn! Verŝajne la trajno de Knokke-Heist malfriiĝis kelkajn minutojn! Mi demandis al la trajnoficisto la horaron de venonta trajno: "je la 9.58a horo". Por pasigi la tempon de 25 minutoj, mi malsupreniris por rigardi la panelojn en la koridoro por vidi la reirhoraron kaj 5 minutoj antaŭ la indikita tempo mi estis denove sur la kajo. Hoho! Nun iu trajno jam forlasis la kajon! Estis la mia kiu ne forveturis je la 9.58a, sed je la 9.52a! Denove atendi 15 min.

Nun mi sukcesis kaj eliris la trajnon kaj atingis la kajon de metroo (post malsupreniro kaj denove supreniro de stuparoj). Schumanrondaplacon mi atingis kaj serĉis la aŭtobushaltejon de linio 60. Tiu placo estas ege granda kaj impona ĉar ĉirkaŭe troviĝas la Eŭropaj Instancoj. Pere de linio 60 mi povus atingi mian celon, post la haltejo de hospitalo Edith Cavell. Facile mi trovis sidlokon proksime de

la ŝoforo, la vojaĝo daŭras minimume 30 minutojn. Do strange, post la unua haltejo la ŝoforo haltigis la motoron kaj forlasis la sidlokon!

"**Ĉi tie estas la fino**, vi devas forlasi la aŭtobuson", li klarigis. Mi klopodis malfermi la pordon, kaj ne sukcesis, mi puŝis sur butonoj sur la pordo, ne helpis, eĉ mi tuŝis la alarbutonon! Ankaŭ la ŝoforo ne tuj sukcesis, nur post longa manipulado de la butonoj. Por alveni ĉe la hospitalo, mi devus preni la buslinion 60 al alia direkto kaj en alia haltejo! Denove atendi 15 minutojn.

Kiam ni komencis veturi, mi konstatis mi ke ne ĉiu haltejo indikas sian nomon, pro tio mi petis la ŝoforon anonci min kiam ni atingos la haltejon de Cavellhospitalo. Volonte li volis fari. La haltejo Brunardstraat li mem ne konis, do mi scias pere de telefonalkvoko de mia amiko Paŭlo Branco, ke mi devus forlasi la aŭtobuson du haltojn post la hospitalo.

Trankvile mi sidiĝis sur la unua sidloko, bone videbla de la ŝoforo. Post certa tempo mi rimarkis ke la strato jam havas la nomon de E.Cavell, kaj poste ne plu, verŝajne mi baldaŭ atingos la hospitalon.

Kiam mi rimarkis ke la aspekto de stratoj ŝanĝiĝis al eksterurbaj, mi demandis al la ŝoforo ĉu estas ankoraŭ longa distanco por atingi la hospitalon, ... ŝokita li pardonpetis, ĉar li tute forgesis min averti! Ni jam estis kvar haltejoj tro for!

Aliflanke de la strato, mi denove devis preni la buson al la alia kontraŭa direkto, ... ĝi ĵus trapasante foriris. Denove atendi 15 minutojn. Mi nun ne plu volis perdi tempon (mi memoras la averton ke ĉiam estas ...



Marlène kun Arie Bouman en Portiragnes longa vico ĉe la konsulejo de Rusio kaj ili certe fermos je la 12.30a horo.

Kiam mi rimarkis ke la buso nun havas ŝoforinon, mi estis preskaŭ certa ke ŝi estos pli akurata kaj atentema. Tuj mi demandis ŝin averti min kiam ni atingos haltejon Brunardstraat. ...ve! ve! ve!.. Ŝi tute ne konis tion haltejon! ... Nur kiam ŝi alvenos al Brunardstr, ŝi povos vidi la nomon sur sia ekrano flanken !

Feliĉe, ne gravas, entuziasme kelkaj kunvojaĝantinoj informis min (eĉ en la nederlanda lingvo) ke ni tre baldaŭ alvenos tie kaj ili eĉ scias ke ĉitie estas la Konsulejo de Rusio. Baldaŭ iu virino diris: "Nun eliru, venu kun mi", ni transpiediris la straton kaj ŝi , por esti certa, demandis al loĝanto: ĉu mi povus en tiu direkto de la strato, trovi la konsulejon?

"**Jes, iom pli for**, sekvu la longan muron de tiu granda lernejo, kaj iom poste maldekstren". Kun grandaj, hastaj paŝoj mi atingis la maldekstran straton kaj tuj rimarkis ke mi nun eĉ unu halto tro frue forlasis la aŭtobuson!

Finfine mi povis plilongigi la vicon ekstere de la konsulejo. Iu rimarkigis ke tiamaniere ni povas alkitimiĝi al Rusaj cirkonstancoj kaj malvarmeco

Siberia. Interne mi devis ankaŭ atendi, ĉar antaŭ mi aliaj personoj de agentejoj prezentis dekojn da demandformularoj kaj ricevis dekojn da vizoj. Je la 12.00a horo mi estis ekstere kaj povis post 10 tagoj reveni por akcepti la vizojn.

La reveturado okazis multe pli rapide! Kaj post 10 tagoj eĉ pli rapide.

Konkludoj:

a) Laŭ mia scio Bruselo estas la plej dulingva regiono, mi rimarkis ke la stratumoj kaj busfinhaltejoj estas dulingvaj (nederlanda kaj franca). Ankaŭ mi ne rimarkis barilojn dum mia busvojaĝo kiu indikas la lingvoparton.

b) Malgraŭ tio mi konstatas kiam mi faris demandoj, unue en la nederlanda, 90% ne komprenas min , mi devis traduki al la Franca lingvo. Ĉu ili tute ne kapablas aŭ volas kompreni? Eĉ iu junulino respondis en la angla!

c) Al kutimoj de publikaj transportiloj oni devas alkitimiĝi! Nur post pluraj provoj oni sukcesas trovi la plej rapidan solvon. Kelkaj semajnoj poste mi denove faris la saman vojaĝon por viziti la Eŭropajn Instancojn okaze de la Malfermita Tago, denove pli rapide parte pere uzo de la metroo. Bedaŭrinde jam je la 20.30a horo ni devis forlasi niajn geamikojn ĉitie por trafi la lastan trajnon al marbordo (nur 140 km).

La plej favoraj argumentoj por uzi la publikajn transportilojn en Belgio ŝajnas al mi:

a) la kostoj: por +65-jaruloj la abono por busoj, tramoj, metrooj estas senpaga (! ĉu vere ekzistas?). Trajnveturo kaj reveturo po 5.20 € (kondice ke oni nur post la 9a horo forveturos dum semajne).

b) la trankvileco (se oni ne strikas, malfruiĝas, korekte informas,).

Arie Bouman, Portiragnes/Knokke-Heist

HOMTRAFIKADO

La malluma flanko de tutmondigo estas homtrafikado, industrio de 32 bilionoj de usonaj dolaroj, la tria plej granda kontraŭleĝa komerco post drogoj kaj armiloj. Ĉiujare 2.4 milionoj homoj trafikiĝas por vendo de hompartoj, infanlaboro, seksekspluado kaj prostitucio.

Sekurecaj instancoj en Egipto pli penas gardi la landlimojn kun Sinai kaj Sudano, tra kiuj okazas la plej granda parto de kontraŭleĝa enmigrado, azilopetado kaj homtrafikado. Laŭdire virinoj el Orienta Eŭropo kaj la antaŭa Sovjeta Unio enmigras al Israelo kaj la EU tra la Sinaia Dezerto per helpo de Beduinuloj. Ankaŭ la haoso en Darfuro, Suda Sudano kaj Etiopio kuraĝigas homtrafikadon el Afriko en Egipton al la Golfaj Ŝtatoj.


Egipto starigis fortan kampanjon per TV kaj konferencoj. Suzanne Mubarak, edzino de la Prezidento forte subtenas la kampanjon. Tamen, Egipto ricevas internacian kritikon, ke sia peno ne sufiĉas, sed iuj opinias, ke Usono kaj Okcidenta Eŭropo estas fontoj pro tia kontraŭleĝa komerco. Internaciaj observantoj opinias, ke Egipto estas ambaŭ fonto kaj vojo por homtrafikado. Bedaŭrinde, iuj vilaĝoj estas varmbedoj por aranĝitaj edziniĝoj kaj infanvendadoj, kiuj okazas kun la permeso de gepatroj, plejparte pro kreskanta malriĉeco.

Car Beduinuloj tiom detale konas la Sinaian Dezerton, Egipto nun volas varbi ilin por sekureco ĉe la landlimoj. Necesas pli da internacia kunlaboro, sed ne ĉiuj landoj kapablas aŭ deziras fari tion. Pluraj kontraŭleĝaj migrantoj ne estas viktimoj de homtrafikoj, ili pagas kontrabandistojn kiuj helpas ilin transiri landlimojn. Oni devas diferencigi inter tiuj du problemoj.

www.labourstart.org/eo/

PAULO COELHO KAJ ESPERANTO

Paulo Coelho naskiĝis en Rio de Janeiro, la 24-an de Aŭgusto 1947. Ĵurnalisto kaj verkisto, aŭtoro de pluraj libroj, li estas la plej vendata brazila aŭtoro en eksterlando. Ekde la 28-a de Oktobro 2002 okupas la Seĝon 21-an de la Brazila Beletra Akademio, kies patrono estas Joaquim Serra. Lia ligiteco al Esperanto devenas de lia unua verko, La Alkemiisto (O Alquimista), kiu antaŭnelonge ricevis sian E-an version pere de la plumo de Carlos Valle. Sur paĝo 57-a de la portugala eldono, li citas Esperanton tre pozitive: "...Sed li necesis antaŭen iri. Li devus kredi la signojn. Dum sia tuta vivo li studis serĉante la lingvon ununuran de la Universo. Unue li interesiĝis pri Esperanto, poste pri religioj, finfine pri Alkemia. Li scipovis Esperanton, komprenis bonege la diversajn religiojn, sed ankoraŭ ne estis Alkemiisto..."(T.R.)



Konsiderante ke liaj verkoj vendiĝas milione estas tre grava la fakto ke Esperanto estas pozitive prezentita al liaj legantoj de la tuta mondo. Sed el kie povas veni tiu pozitiva sinteno lia rilate al Esperanto. Mi kredas ke mi povas konjekti kaj provi trovi eksplikon por tio. En la dua duono de la 80-aj jaroj, kiam li ankoraŭ ne estis

5
tutmonde fama, mi decidis proponi instruadon de Esperanto en pluraj lokoj de Rio de Janeiro. Tiucele mi kontaktis la esoteran centron "Avatar" en la kvartalo Botafogo. Mi estis akceptita de ĝia Direktorino. Ŝi estis Cristina Oiticica, kiu estas ĝuste la edzino de Paulo Coelho. Post prezento de mia propono kaj akcepto, ŝi babilante kun mi diris: "Mi kaj mia edzo, Paulo Coelho, estas geamikoj de iu esperantisto. Li nomiĝas Diderot Freitas kaj ofte ni renkontiĝas por longaj babiladoj". Kaj fakte en la unua posta kontakto, kiun mi havis kun Diderot Freitas (=Diderto Freto), li konfirmis la informon. Do mi supozas ke la pozitiva sinteno de Paulo Coelho rilate al Esperanto probable devenas de tiaj fruktodonaj kontaktoj kun Diderot Freitas. Aldone mi devas diri ke ĉi-jare Paulo Coelho tre simpatie rilatis al Carlos Valle, permesante al li, sen pago de aŭtorrajtoj, la eldonon de lia verko La Alkemiisto en Esperanto.

Aloisio Sartorato, Brazilo

VIZITU ZINKMINEJON

Senlime de Kelmis proponas al vi virtualan viziton de iama subtera zinkminejo. Oni delonge opiniis ke ĉiuj spuroj de la subteraj zinkminejoj estas malaperintaj. Freŝaj serĉadoj kaj fotadoj de la Lieĝa universitato nin malkovrigis mirigajn postrestaĵojn. Oni do proponas al vi bildojn pri la subtera Kelmiso. Tiun malkovron eble sekvos aliaj, sed - almenaŭ provizore - la enirejo restu kaŝata kaj la eniro malpermesata pro la danĝeroj (falo, gasoj, k.t.p.). Vidu la belajn fotojn sur jena ttt-ejo (ne esperantigita).

<http://tchorski.morkitu.org/3/calamine-01.htm>

6

KELMIS LA CALAMINE

Jen agado de trilanda klubo de Esperanto Amikejo Senlime B-NL-G

21-05-2010; 19h30, vendrede, "Hunoj en Vaals". Prelego en kafejo Select de Mathieu Schrymecker, historiisto nia, kiu enhavas historian parton pri la Hunoj kaj filmon pri la Huna dutaga festivalo en Vaals. Stranga kaj nekredinda titolo por prelego, ĉar Hunoj ne plu ekzistas; ili malaperis je la kvina jarcento de nia erao. Tiuj, kiuj lernis pri tiu popolo, konas ĉefon Attila. En Vaals, la plej suda urbeto de Nederlando, okazis por la unua fojo kvazaŭa internacia Huna kunveno. Dank'al tiu neordinara evento ĉirkaŭ la Huna kampo dum la unua semajnfino de la monato aŭgusto multe da interesatoj ekaŭdis kaj eksciis pri la Hunoj. Membroj de la freŝbakita Huna klubo de Vaals plezurege rakontis kaj klarigis Hunan historion al scivolemaj gevizitantoj. Kompreneble la aktivaj geklubanoj portis vestaĵojn de la Huna epoko. La prezidanto de la Vaalsa grupo eniris la rolon de la Huna ĉefo Attila. Por starigi vastan programon kaj realigi kampon cele konigi al la publiko kiamaniere kelkaj homoj pasigas libertempon en la rondo de falsaj Hunoj, la grupo de Vaals invitis Hunajn geamikojn el pluraj germanaj urboj, interalie el Kolonjo kaj Frankfurto. Same kiel la nederlandoj, la germanaj semajnfinaj Hunoj entuziasme informis kaj ĝoje permesis filmi en la tendoj. Bedaŭrinde por Attila kaj por liaj Hunoj-samideanoj, la pluvo interrompis la ceremonion de la dua tago.

18-06-2010 ; karaokeo vendrede, en kafejo Select, la Calamine Kelmis.
03-10-2010; trilanda renkontiĝo en Ŭeris {WERIS}. Depost Bonn, la 23an de majo 2009, ne plu okazis trilanda renkontiĝo: kalendare netolerebla situacio! Pro tio, la Verviersa Esperanto-Grupo reprenas la verdstelan torĉon kaj mem organizas plian trilandan renkontiĝon en Belgio, precize en Ueris [WERIS], unu el la plej ĉarmaj vilaĝoj en Belgio, en la administra teritorio de la urbo Durbuy (plej malgranda urbo en Belgio), situanta apud la suda limo de nia "Senlima agadkampo": Eŭregiono Mozo-Rejno.

Tiun vilaĝon oni kelkfoje (verdire multe troige) nomas "Belga Stonehenge" pro vasta tiea megalita kampo longa je 8 km. Oni trovis en tiu regiono 28 diversajn megalitojn (kaj oni suspektas la ĉeeston de multaj aliaj), zorgeme lokigitaj laŭ linioj kaj astronomiaj donitaĵoj, inter kiuj la dolmeno de Weris, tombo starigita de neolitikaj terkulturistoj, antaŭ 5000 jaroj... kio nepre pensigos nin pri Atlantido (Santorino), Keltoj (Hunoj), ktp...! Agrabla tago en perspektivo, precipe se brilos aŭtuna suno - sed se pluvos vi eble memoros pri Bretonio (Karnak,...)!

Provizora programo:

10h00 malfermo de la akceptejo (trinkejo de la muzeo pri megalitoj).

11h00 vizito de la muzeo pri megalitoj.

12h00 tagmanĝo (eble kun "dolmena pasteĉo").

14h00 pieda promenado en la megalita kampo.

16h00 komuna manĝeto (ĉu vi ŝatus lokan bieron "Dolmenius"?).

amikejo@yahoo.com

MESAĜO AL SINJORO 903

Kiu ĉi tie parolas estas la viro de la 1003. Konsternite, antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis viziton de la zorgisto, kiu montris al mi la leteron kun via plendo pri bruado en mia apartamento. Poste, mi ricevis vian viziton mem - eble, noktomeze - kaj vian vivegan buŝan plendon. Mi devas diri al vi, ke mi bedaŭregas ĉi ĉion kaj opinias, ke vi tute pravas. La reglamento de la konstruaĵo estas sufiĉe klara kaj eĉ se ĝi ne estus, vi cetere havus je via dispono la Leĝon kaj la Policon. Kiu laboras dum la tuta tago havas la rajton pri nokta ripozo kaj, ne eblas dormi, kiam la 1003 moviĝadas. Ĉar mi ne scias vian nomon, nek vi la mian, ni restos limigitaj al du numeroj, du numeroj kolumnigitaj inter dekoj da aliaj. Mi, la 1003, havas kiel orientan limon la 1005, kiel okcidentan la 1001, kiel sudan la Atlantikan Oceanon, kiel nordan la 1004, supre la 1103 kaj sube la 903 - kiu estas vi mem. Ĉi ĉiuj numeroj estas bonkonduktaj kaj silentaj. Nur mi kaj la Atlantika Oceano faras iom da bruado kaj funkcias ekster la civilaj horaroj. Nur ni ambaŭ moviĝadas kaj muĝadas laŭ la kapricoj de la tajdo, de la ventoj kaj de la luno. Mi sincere promesas adopti de nun, ekde la 10 p.t.m., konduton similan al tiu de kvietaj blua laĝeto. Promesite. Tiu, kiu venos al mia hejmo (pardonu, al mia numero), estos invitita foriri je la 09:45 p.t.m., kaj mi klarigos: la 903 bezonas ripozo de la 10- a p.t.m. ĝis la 7-a matene, ĉar je la 8-a kaj kvarono li devas elbuŝiĝi el la 783 por preni la 109, kiu kondukos lin ĝis la 527 de la alia strato, kie li laboras en ĉambro 305. Nia vivo, najbaro, estas plene

numerita, kaj mi konfesas, ke ĝi nur povas fariĝi tolerebla, kiam numero ne ĝenas alian numeron, sed respektos ĝin, obeante la limojn de siaj ciferoj. Mi pardonpetas kaj promesas silenton.

... Sed oni permesu al mi revii pri alia vivo kaj alia mondo, kie ekzistas homo, kiu frapas la pardonon de aliulo kaj diras: "Najbaro, estas la 3-a post noktomezo kaj mi aŭdis muzikon de via hejmo. Jen mi." Kaj la alia respondas: "Eniru, najbaro, kaj manĝu de mia pano kaj trinku de mia vino. Ĉi tie, ni ĉiuj estas dancantaj kaj kantantaj, ĉar ni eltrovis, ke la vivo mallongas kaj la luno estas bela." Kaj la viro alvenigas sian edzinon, kaj la du restas inter la geamikoj de la najbaro prikantantaj kantojn por danki al Dio la brilon de la steloj kaj la murmuradon de la milda venteto tra la arboj, kaj la vivdonacon kaj la amikecon inter homoj kaj la amon kaj la pacon.

Verkis Rubem Braga, Brazilo
Elportugaligis Fernando J. G. Marinho, INKO, KKE



La 26a Rusia E-Kongreso, 26-31 Majo 2010, en S.Petersburgo havis dekon da ge-belganoj, 5% de 200 ĉeestantoj, nome ge-Bouman, ge-Tytgat, ge-Branco, Delforge, Poterucha, Rysenaer, Haazen. La postkongreso okazis en Moskvo 1-7 Junio 2010

PRI POLA RADIO

Laŭ la decido de la superuloj de Pola Radio, ekde la 17-a de majo la sola salajrata laboranto de ĝia Esperanto-redakcio, Gabi Kosiarska, kaj kelkaj aliaj dungitoj okupiĝos pri laboroj ligitaj kun ŝanĝoj en la interreta portalo de la Radio. La funkciado de la Esperanta servo estas frostigita por la daŭro de tiu nova tasko, kies longeco ne estas precize difinita. En la paĝaro de la Esperanto-redakcio intertempe aperados ripetoj de programeroj, supozeble lunde, merkrede kaj vendrede. Oni flegas la esperon, ke post kelka tempo ĉiuj, kiuj estis komisiitaj pri la nova tasko, povos reveni al siaj kutimaj okupoj, interalie Gabi Kosiarska al la Esperanta sekcio.

Kun demandoj pri la nova situacio oni povas turni sin al la Prezidanto de Pola Radio, Jarosław Hasinski, Prezes Zarzadu PR S.A., al Niepodleglosci 77/85, 00-977 Warszawa, Pollando (rete: Jaroslaw.Hasinski@polskieradio.pl) aŭ, laŭ la sama poŝta adreso, al Pawel Majcher, Czlonek Zarzadu. Oni skribu en sia nacia lingvo, la angla aŭ la pola. Leteroj sole en Esperanto estas malkonsilindaj. La adresatoj estas la prezidanto de la estraro, respektive membro de la estraro de Pola Radio.

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio komenciĝis en aprilo 1959, sojle de la Zamenhof-jubilea UK en Varsovio. Ĝis hodiaŭ ili estas ege popularaj kaj elstare kontribuis al la diskonigo de Pollando kaj ankaŭ al la informado pri la Esperanto-vivo. En 1993 UEA premiis la Esperanto-redakcion per la prestiĝa Premio Deguĉi. Bona pruvo

pri la daŭra populareco de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas la kreo de ties amikaro en Facebook, al kiu en nuraj tri monatoj aliĝis pli ol 800 ŝatantoj.

Retejo de la Esperanto-redakcio, kun ligiloj al la podkastaj elsendoj:

<http://www.polskieradio.pl/eo/>
UEA Gazetaraj Komunikoj, N-ro 379, 2010-05-15

KREDO SAVAS!

Sinjinoro Pia Beatulino estas muzikorganistino en la Katedralo de Sankta Triopo, virga fraŭlino, okdek jaraĝa. Ĉiuj geparohanoj aprecas ŝin pro ŝia naiveco, simpleco, kandeco, dolĉeco. Iu posttagmezo ŝi invitis junan pastron, la novan paroĥestron, por teumi ĉe ŝi. Tiam kiam ŝi preparis la teon, li restis sidante sur brakseĝa fotelo kaj rigardis, sur la muzika organo, grandan ujon kun akvo kaj ene prezervativa kondono subakviĝis. Kiam Sinjinoro Pia Beatulino kunportis la teon kun buterostpano kaj biskvito, la pastro ne povis silenti sian scivolemon pri la prezervativa kondono kaj demandis la kialon de tiela ornamaĵo sur la organo. Ŝi respondis fingre indikante la akvuĵon: "Ah! Vi celas mencii tion? Mirinda, ĉu ne? Kelkaj monatoj antaŭe, promenante tra la urba parko, mi trovis pakaĝeton surtere. La instrukcioj konsilis konservi ĝin malseka metante sur la organo, tiamaniere oni evitus ĉiujn malsanecojn. Kaj ĉu Vi scias la sekvon? Ĉi Vintre mi eĉ ankoraŭ ne malvarmumiĝis!" Kaj la mirigita pastro komentis: "Ho, ho, ho! mia kara fratino laŭ Dio nia patro, Kredo estas Savo, ĉu ne?"

Serafim Marques, Lisabono, Portugalujo

NOVELETO 15 (7a-13a jarcentoj)

Estis sciigite al mi, ke haltis en Bagdado pilgrimanto kunportanta bidan kolrington valorantan mil dinarojn. Li sensukcese klopodis ĝin vendi. Li iris al laŭdire honestega farmaciisto kaj deponis ĝin ĉe li. Finpilgriminte, li revenis kaj reiris al la farmaciisto, al kiu li prezentis donaceton. La farmaciisto diris lin : « Kiu estas vi, kaj kion signifas tio ĉio ? » La pilgrimanto respondis : « Mi estas la proprulo de la kolringo, kiun mi deponis ĉe vi. » Apenaŭ li respondis, la farmaciisto elpuŝis lin per piedbatoj el sia butikoj, dirante : « Vi aŭdacas kvereli min pro simila akuzo ! » La pasantoj amasiĝis kaj krude alparolis la pilgrimanton : « Ve al vi ! Tiu homo estas honestulo ! Ĉu vi ne trovis alian personon por viaj akuzoj krom ĝuste tiu ? » La pilgrimanto perpleksiĝis. Li plurfoje iris al la farmaciisto, de kiu li nur ricevis pliajn insultojn kaj batojn. Oni diris al li ; « Ĉu vi iru al Adudo ad-Daŭlato ? Li disponas sagacecon por tiuspecaj aferoj. » Li do skribis sian travivaĵon en papereto kaj ĝin fiksitis ĉe la ekstremaĵo de stango, kiun li levis en la direkto al Adudo ad-Daŭlato. Tiu hoĵis lin kaj, kiam li sufiĉe alproksimiĝis, pridemandis lin pri lia stato. Li rakontis al li sian aventuron. Ad-Daŭlato diris lin : « Morgaŭ iru al la farmaciisto kaj sidiĝu sur la perono. Se li malpermesas al vi tion fari, sidiĝu sur la vidalvida perono, de tagiĝo al krepusko, kaj senparole. Faru tion tri tagojn. La kvaran tagon, mi pasos preter vi kaj haltos por vin saluti. Ne leviĝu pro mi kaj apenaŭ reciproku mian saluton. Kaj limigu vin al respondo de miaj demandoj. Tuj kiam mi estos forinta, revenigu al li penson pri la kolringo kaj poste sciigu al mi kion li diris al vi. Se li redonas ĝin al vi, alportu ĝin al mi. » Li do iris al la butikoj de la farmaciisto sidiĝi sur ĝia perono, sed la farmaciisto malpermesis al li tion fari. Li moviĝis

9
ĝis la vidalvida perono kaj tie sidiĝis tri tagojn. La kvaran tagon, marŝis sur la strato Adudo ad-Daŭlato en akompano de impona procesio. Ekvidinte la ĥurasananon [la pilgrimanto elvenas de Ĥurasano, Nord-Orienta provinco de Irano], li haltis kaj diris : « Savo super vi ! » (salam 'alajkum) [tradicia islama saluta formulo, kies senco estas : « viglu la (Allaha) savo super vi » ; deveno de la franca vorto « salamalec »]. La ĥurasano senmoviĝe respondis : « Savo super vi ! » Adudo ad-Daŭlato, plu haltante kune kun sia gvardaro, metis al li demandojn akompanatajn de signoj de respekto al li. La sidiĝanto tenis sin kiel estis interkonsentite kaj respondis lakone. Koncerne la farmaciiston, ne multe mankis, ke li mortu el timo. Tuj kiam la procesio formarŝis, la farmaciisto turnis sin al la pilgrimanto kaj diris lin : « He, povrulo ! Kiam vi konfidis al mi kolrington, kaj kiel ĝi aspektas ? Rememorigu tion al mi, eble tio revenos en mian memoron. » Li respondis : « Ĝia eksteraĵo estas tia-tia. » Li ekserĉis kaj skuante terkruĉon eligis el ĝi la kolrington, kiu falis; tiam li diris : « Mi estis tute forgesinta ĝin, kaj sen via helpa rememorigo mi restus ĉe mia forgeso. » La pilgrimanto prenis la kolrington kaj diris al si mem : « Kia avantaĝo mi obtenos se mi informos Adudon as-Daŭlato ? » Iom poste li ankaŭ diris al si : « Eble li intencas aĉeti ĝin de mi. » Kaj li iris al li kaj informis lin pri kio okazis. Adudo ad-Daŭlato sendis lin en akompano de la ĉambelano al la butikoj de la farmaciisto. La ĉambelano pendigis la kolringo ĉirkaŭ la kolo de la farmaciisto, krucumis lin sur la pordo de lia butikoj, kaj distrumpetigis pri li : « Jen la puno por iu, kiu akceptis deponaĵon kaj rifuzis redoni ĝin ! » Kiam finiĝis la tago, la ĉambelano prenis la kolrington, donis ĝin al la pilgrimanto, kaj diris al li : « Vi povas foriri. » *Ibn al-Ĝaŭzijo, Libro de la inteligentuloj,*

Jacob Hasbun, membro de EBG, elarabigis

10

LA LUZIDOJ DE CAMOENS

Kanto 5, 49-60, paĝo 205, elŝtona Giganto Adamastoro sin prezentas al la maristoj portugaliaj trapasantaj la Kabo de Bonespero sude de Afriko.

49 Daŭrige la horora monstro vortis pri nia fato, kiam kun defio mi lin demandis : "Miron al mi portis ĉi korpo de giganto. Vi estas kio?" La buŝon kaj l' okulojn nigrajn tordis li kaj post laŭta kaj terura krio respondis per amara voĉo peza, ke ŝajnis la demando malkompleza;
50 "Mi estas la kaŝita granda kabo de vi nomata Kabo de l' Turmento; al Pomponio, Ptolemeo, Strabo, Plinio, nekonata, kaj al gento antikva; kvazaŭ fino per bartrabo mi estas de l' afrika kontinento kaj al l' polus' antarkta min etendas, sed vi per troaŭdaco min ofendas!
51 Adamastor', mi kruda fil' de Tero, kun Encelad', Egeo, Centimano, spitantaj estis en militafero al la vibrant' de fulmoj de Vulkano; ne montojn staplis mi, sed per konkero agis de l' ondoj de la Oceano: mi estis kapitan' de l' mar' tranĉata de l' floto de Neptun', de mi serĉata.
52 L' edzinon de Peleo mi troamis; por am' al ŝi en tiun riskon venis; por la ĉieldiinoj mi ne flamis, ĉar nur la marprincino min katenis. Kun la Nereidinoj ŝi sin banis surplage nuda; mian koron prenis ŝi tuj kaj ĝin ankoraŭ tiel regas, ke mi nenion plian deziregas.
53 Ĉar havi ŝin ne povis mi esperi pro l' ega malbeleco' de mia vido, intencis mi perforte ŝin konkeri; Dorisan alparolis pri l' decido. Pro timo volis la diino peri, sed ŝi, kun bela kaj honesta rido: "Ĉu estas nimfa am' en tia kvanto, por kontentigi tiun de Giganto?"
54 Sed trovis mi rimedon, kun evito mian honoron perdi, por la savo de Ocean' el tiom da milito." Jen estis de l' respondo la enhavo. Ne povis mi ne esti enkaptito

(ja grandas de l' amantoj blinda ravo); plenigis mian bruston ĝis la fundo deziroj kaj esperoj kun abundo.
55 Mi, stulta, la militon tuj formetis; en nokto, difinita de Dorisa, por mi en malproksimo sin portretis l' unika, nuda blanko de Tetisa. Freneze, brakaperte mi impetis; okule, hare, vange mi per kisa deliro kovris tiun, kiu estis la vivo, kiu min korpon estris.
56 L' amaron, ho! ne diras ĉi rakonto: Mi kredis ĉirkaŭbraki la amatan, sed densan kovron de durega monto, arbaron, ĉirkaŭbrakis mi, malglatan. Rokegon trovis mi ĉe mia fronto kaj premis, ne vizaĝon delikatan; ne hom' mi restis, ne, sed muta bloko senmova, ĉe la rok' alia roko!
57 Ho nimfo, la plej bela de la maro, se tro malplaĉis mia kompanio, kial vi min ne lasis en eraro, ĉu estus monto, nuboj aŭ nenio? Forkuris mi, freneza pro amaro, pro malhonoro, plena de rabio, alian mondon, por nenion vidi pri mia ploro kaj aflikto ridi.
58 Jam tiam miaj fratoj, mia klano, venkitaj estis; en mizer' ekstrema por plia sekureco' de l' dia vano jam parton kovris montostaplo prema. Ĉar kontraŭ la ĉiel' ne helpas mano, mi, ĉagrenite, en plorado ĝema eksentis malamika jam Fortunon, kaj de la far' aŭdaca nun la punon.
59 Fariĝis mia karno tera duro, kaj miaj ostoj ŝtonigitaj estis; de vi vidataj membroj kaj figuro sternitaj tra ĉi longaj akvoj restis. Finfine min, giganton laŭ staturo, transformis en ĉi kabon kaj arestis la dioj; la ĉagren' duoble gravas, ĉar min Tetisaj akvoj ĉirkaŭlavis."
60 Li tion diris kaj post ega ploro subite jam neniu plu lin vidis. La nigra nub' solviĝis kaj ĝis foro surmaren la sonora blek' inciĝis. La manojn al la sankta anĝelhoroj mi levis, kiu nin ĉi-foren gvidis, al Dio petis mi formovi durajn aferojn, laŭ Adamastor' futurajn. Leopoldo Knoedt, Brazilo, elportugaliĝis

KIAM VI NE ESTAS KUN MI

Rozujo, el rozoj glaciaj,
kiuj folioj tre langvore
lulas, pro la vento, angore
inter blovoj de agoniaj
kantoj, de malĝojoj pasiaj.
Ĝardeno de velkintaj floroj,
sen koloroj nek bonodoroj,
kie nur la timo ekzistas
kaj la vivo tie konsistas
el akraj suferoj kaj ploroj.

Mia stato estas glacia
kiam ne estas kun la via.

Ĉielo per nuboj kovrita
de tuloj el nokto intensa,
kie la nigreco tro densa
estas nebulo difuzita
en la veluro infinita,
sen luma luno nek lumstelo,
eĉ ne brilas en la ĉielo
tremlumetoj: kosma nenio,
universala letargio
reĝas en la nokto-sen helo.

Sen luma nokto mi estas
kiam vi kun mi ne nestas.

Maro dronante en l' mistera
nenio de l' nokto; makulo,
rampante kiele rampulo
sur l' sfera supraĵo; danĝera
nebulo, sen rumbo nek vera
destino. Maro letargia,
kaŝita en l' nubo magia,
sen horizonto, sen sunbrilo,
sen krepuska mara trankvilo,
kaj, sen lumfalstelo radia.

Nigrmaro estas l' koro mia
kiam ne estas kun la via.

Seka kaj danĝera dezerto
sen vivo: senfrukta tereno;
tragika bildo, muta-scena
pejzaĝo de movo malcerta
kie neniu estas sperta,
sur l' sabla malkvieta maro,
el fantomaj dunaj ondaroj,
disbatitaj de la sumumo
kaj bruligitaj de sunlumo,
kiel en dezerto- Saharo.

Kiele dezerto estas mi
kiam mi ne kunestas kun vi.

Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

AL SYLLA MAGALHÃES CHAVES

Poeton ni omaĝu poezie,
Ĉar vorto vere belas ĝuste tie
Kie muzoj troviĝas kaj la gloro
Eterne cizeligas sur la oro

Poeto Sylla Chaves, vi ĉeestas
Alian dimension, kie festas
La pacaj batalantoj antaŭ Dio,
Al Kiu preĝas nun Esperantio.

Nun restas tie ĉi nia sopiro
Kaj tamen ĉe ni kreskas la inspiro
El via vigla verko, verda flamo.

Adiaŭ nun ni diras, kara Sylla,
Kaj ĉiam zorgu ni pri via brila
Ekzemplo de espero kaj de amo.
Leite Junior, Brazilo

ELSTARAJ ESPERANTISTOJ**SYLLA MAGALHÃES CHAVES**

Naskiĝis la 2-an de Junio 1929, en la
sudbrazila urbo Santana do
Livramento, subŝtato Rio Grande do
Sul, Brazilo, urbo situanta tre
proksime al la brazila-urugvaja
landlimo. Forpasis la 30-an de Majo
2009.

Laŭ li mem “li estis filo de la
poliglotaĵo gepoetoj Tullio kaj Zillah
Chaves”, kiujn li profunde amis. Sylla
ne estis sola filo. Li estis la kvina el
ses gefiloj de gesinjoroj Chaves:
Marilia, Mario, Lúcia, Lívio kaj
Flavio, kun kiuj li havis bonegajn
rilatojn. Sylla alte aprezis la familiajn
valorojn, kiujn li bone tradukis en la
muzikteĝo jena kun titolo :

FAMILIO ESTAS ĈIO

**Mi rememoras mian tempon
de printempo**

apud patro kaj patrin’!

**Por infanoj familio estas ĉio....
sed ne ĉiuj havas ĝin.**

**La familio estas bela
don’ ĉiela!**

**En la preĝoj petu ni,
ke por infanoj de la mondo,
en estonto,
ne plu manku famili’.**

Estis en la familia sino, ke Sylla lernis
ami Esperanton. Lia unua kontakto
kun la lingvo internacia okazis en
1936, kiam Mário Prestinari, fervora
gauĉa esperantisto, konvinkis la tutan
familion lerni Esperanton. Li mem
konfesis, ke de tiu epoko restis en lia
memoro kelkaj vortoj kiaj *kokideto*.
Kaj estis danke al la bone organizitaj
kajeroj de sia fratino Marilia, ke li

jarojn poste sukcesis serioze komenci
la lernadon de Esperanto. En 1937 la
tuta familio translokiĝis al Rio-de-
Janeiro, kie li en 1946, post memlerno
kaj legado de du libroj, informiĝis pri
la ekzisto de Brazila E-Ligo kaj
fariĝis “profesoro aprobita” post
ekzameno kun la fama Porto Carreiro
Neto. Kaj en la libro «*Não só
Idealistas mas Realizadores*» (*Ne nur
Idealistoj sed ankaŭ Agantoj*) li
asertas ke “en tiu jaro mi ne nur lernis
la lingvon, sed alproprigis al mi por la
tuta vivo la ideologion de Esperanto”.

Pri lia profesia vivo, estas interese
scii, ke li volis esti arkitekto, tamen
studis Juron, fako en kiu li diplomiĝis
en 1954. Sed jam en 1950 li estis
aprobita en internacia konkurso kaj
fariĝis oficisto de la Sekretariejo de
Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko, urbo
kie li loĝis inter 1950 kaj 1953.
Tamen lia ĉefa profesia okupo estis
tiu de profesoro, precipe pri
komunikado, en supera lernejo de
administrado ĉe Fondaĵo Getúlio
Vargas, en Rio, dum pli ol 40 jaroj
ekde 1953. Inter 1954 kaj 1956, li
studis politikan sciencon en Parizo,
kiel stipendiito de UN. Kaj inter 1957
kaj 1960, li loĝis en Parizo, kie li
laboris, post partopreno en internacia
selektado, ĉe la Sekretariejo de
UNESCO. En 1970 li iris denove
studi, kiel stipendiito de la usona
registaro, en Kalifornio, Usono, kie li
magistriĝis pri komunikado en 1970.
En la 80-aj jaroj li estis dum du
monatoj invitita profesoro en la
Instituto pri Kibernetika Pedagogio de
la Universitato Paderborn, Germanio.

Per modernaj instruiloj Chaves
provizis la brazilan movadon: krom
multaj lerno- kaj legolibroj, afiŝoj,
aŭdvidaj materialoj, teatraĵoj kaj la

volumo "100 jaroj da kantado en Esperanto" (1989), aperis de li amaso da diskoj kaj kasedoj, ĉiuj kun profesiaj muzikistoj. Li kompilis la 2100-vortan "Suplemento al la Granda vortaro Esperanto-Portugala" de Ismael Gomes Braga (1989) kaj en 1991 aperis lia populara "Originala Esperanta bildvortaro".



Sylla Magalhães Chaves
prezidanto de Brazila Esperanto-
Ligo 1978-82, membro de la
Akademio de Esperanto 1986-96,
UEA Honora Membro ekde 1992.

(vidu ankaŭ Aktuala 2009/8)

INTERMONAĤAJ Bataloj

Polico devis restarigi ordon ĉe unu el la plej sanktaj Kristanaj ejoj post kiam amasa interbatiĝo ekflamis inter monaĥoj en la Malnova Urbo de Jerusalemo. Batalado erupciis inter Grekortodoksaj kaj Armenaj monaĥoj ĉe la Preĝejo de la Sankta Tombo, la tradicia ejo de Krista krucumado. Du monaĥoj de ĉiu flanko estis detenataj kiam dekoj da preĝantoj komencis pied- kaj pugnobati ĉe la sanktejo,

13

diris la polico. Problemoj ekflamis kiam Armenoj volis marki la ĉiujaran feston de la Kruco. Ŝokitaj pilgrimantoj rigardis kiel ornamaĵoj kaj tapiŝoj estis faligitaj dum tiu dimanĉa batalo. Vestitaj per la mesvestoj de la Grekortodoksa kaj Armena konfesioj, rivalaj monaĥoj interbatalis kaj provis preni ĉion, kion ili povis havigi al si. La Grekoj kulpigis la Armenojn pro tio, ke ili ne agnoskas iliajn rajtojn en la sankta ejo, dum la Armenoj diris, ke la Grekoj malobservis unu el iliaj tradiciaj ceremonioj. Armena kleriko diris, ke la Grekaj klerikuloj provis loki unu el iliaj monaĥoj en la Edicule, antikva strukturo kiu laŭdire enfermas la tombon de Jesuo.

"Tio, kio okazas ĉi tie estas malobservo de antaŭstato. La Grekoj provis tiel ofte meti ilian monaĥon en la tombon sed ili ne rajtas, kiam la Armenoj celebras ilian feston," li diris. La Armenoj prepariĝas por memorfesti la 4-an jarcenton de la eltrovo de la kruco kiu laŭkredeble estis uzita por krucumi Jesuon. Greka kleriko deklaris "Ni protestis pace, ni staris ĉi tie en la mezo kaj ni asertis, ke ni ne lasos la procesion finiĝi, krom se ili lasos nia gardanto ankaŭ ĉeesti. Ĉi tio ne okazis kaj en tiu momento la polico sin trudis." Ses Kristanaj eklezioj, de iuj nomitaj sektoj, dividas regon de la antikva preĝejo kaj alfrontiĝoj inter ili oftas, sed malofte iras ĝis perfortaj agoj. La diversaj Kristanaj sektoj ĵaluze volas gardi iliajn sekciojn kaj rajtojn je aliro al la sanktejo. Por eviti ian ajn konflikton, la ŝlosiloj de la sankta preĝejo restas de sep jarcentoj en la manoj de du Islamaj familioj.

eventeo.net

14

ORELLANA LETERAS

Artikolo pri malapero de miloj da eŭroj el konto de Internacia Esperanto Instituto en Hago, Nederlando, kaj pri la subita maldungo de Atilio Orellana Rojas, la direktoro, estis publikigita de Libera Folio. Antaŭe, Atilio Orellana Rojas estis petita komenti la temon, sed neniu respondo alvenis. Pli ol tri monatojn post la apero de la artikolo, li sendis al Libera Folio leteron, en kiu li asertas, ke pri eventuala monomanko en kontoj de IEI kulpas ne li, sed probable "nepotismo, investo en privataj projektoj kaj la kutimo senkvitance en- kaj elspezi por eviti la pagon de impostoj". Lia propra monŝuldo al IEI laŭ li temas pri nepagitaj luoj, kiujn li pretas sed ne kapablas pagi. La letero de Atilio Orellana Rojas estas aperigata sen ŝanĝoj, laŭ lia peto.

Mi ne tuj reagis al invitoj komentarii vian artikolon, ĉar ne estas en mia karaktero enmiksiĝi en disputoj aŭ reagi al kiu atakas aŭ ofendas. Pluraj geamikoj kaj proksimuloj konsilis, tamen, iel esprimi min.

Mi konstatas, ke via teksto unue ne konigas la identecon de viaj informantoj kaj due kondukas la leganton al malicaj suspektoj. Bv diri la nomojn de viaj fontoj. De kiam mi forlasis mian laborejon, mi ricevadas anonimajn mesaĝojn eĉ minacantajn mian vivon. Ĉu eble viaj 'informantoj' estas la samaj personoj, kiuj konscias pri la farita krimo kaj bezonas maskon por ataki?

En mia laborejo al mi gravis la ekzisto de strategia laborplano kaj kalendaro por povi plenumi ĝin, ĉar tiel la organizo gvideblus al atingo de la statutaj celoj kaj mi ĉesos iradi

sencele ĉiudirekten sen scii, kial farendas tio aŭ jeno. Diversaj provoj tra la jaroj atingi tian klarecon ne donis rezulton. De 2008 la sento pri frustrigo pro tiu situacio kreskadis kaj fine mi komprenis, ke mia ciklo tie alvenis al la fino. Tiutage mi ekserĉis laboron.

Nur malgranda interesaĵo: dum UK en Pollando, nederlanda Esperantisto al mi diris, ke persono proksima al la estrara cirklo al li diris, ke ili baldaŭ forigos min de la organizo. Mi respondis, ke mi ne estis informita rekte de ili pri tiaj planoj. Klare, do, longe antaŭ oktobro 2009 la estraro volis seniĝi de mi. Nenia subiteco, do, en la foriro.

Kio pri la loĝejo? Eklaboronte en Nederlando, miaj dungontoj proponis al mi senpagan loĝejon. Jaroj poste venis la devo pagi modestprezan luon. En 2006 estis interkonsentite, ke la apartamento estos "laborloĝejo", do, mi rajtos okupi ĝin dum mi tie laboros. Kutima aranĝo plurloke en la mondo kaj kiam la laboro finiĝas, la luanto forlasas la loĝejon en periodo indikita en la lukontrakto. Ĉar mi ĉesis labori, mi forlasis la apartamenton.

La luprezo estis 'favora', sed ne por mi. En 2006 ĝi kreskis plurfoje kompare al tiu en antaŭaj jaroj kaj estis aldonita la devo pagi kostojn antaŭe ne kalkulitaj al la luantoj. Atentigoj pri la troa alteco ne donis rezulton. Mi invitis reprezentanton de la lukomisiono por viziti la loĝejon. Tiu instanco en Nederlando povas taksi la valoron de la lupago petebla de ludonanto. Mia ago kaŭzis, ke miaj estroj ekmalkontentis pri mi.

En Nederlando ĉiu esenca modifo en la dominterno estas komunikenda al

la urbaj instancoj, ĉar tio influas la altecon de impostoj kaj servoj. La estraro ne anoncis, ke 2 etaĝoj estis transformitaj en 2 sendependaj apartamentoj. Tio efikis ĉe mia poŝo: pro la alteco de fakturoj mi petis klarigojn al la urbaj instancoj kaj tiam evidentiĝis, ke la sumo postulata estis por familio. En la urbodomaj registroj estis indikoj pri 2 samdomaj loĝantoj kaj ĉar ili ne sciis pri la ekzisto de 2 apartamentoj kun po 1 loĝanto, oni konsideris nin familio. Tiam ankaŭ klariĝis kial aliaj fakturoj venis por loĝejo 122 m2 dum mia apartamento estis nur 47 m2. Mi estis paginta dum jaroj por 2-etaĝa spaco! La kontakto kun urbaj instancoj kaj la postulo sendi kontroliston por konstati, ke efektive mi loĝis en sendependa apartamento kaŭzis pliajn konfrontiĝojn kun la estraro.

La luprezo estis ne rekonsiderebla kaj oni nur akceptis, ke mi pagu kio eblis kun la sekvo, ke mi komencis ŝuldi parton ĉiun monaton. Mono ne 'likis', sed ne atingis konton, ĉar mi ne havis la kapablon pagi. Preteco miaflanke kovri tiun ŝuldatan parton ja estas.

Se eventuale la Internacia Esperanto-Instituto asertus pri malapero de mono de donacintoj, bv enketi ĉe ili, kiel tio povus okazi. Mi ne kompetentas respondi ilianome kaj ĉiukaze mi ne scias ion ajn pri tio, ĉar dum mia deĵorperiodo io tia neniam okazis.

Verŝajne nepotismo, investo en privataj projektoj kaj la kutimo senkvitance en- kaj elspezi por eviti la pagon de impostoj povus helpi vin trovi pliajn klarigojn.

Mi petas, do, ke vi konigu mian tekston kaj ke vi ne modifu ĝin.


Atilio Orellana Rojas



Atilio Orellana Rojas

Nota de L.F.: Libera Folio evidente neniam kaj al neniuj diskonigas la nomojn de informfontoj kiuj deziras resti anonimaj, sekvante la normalajn ĵurnalismajn principojn kaj la Konstitucian Leĝon pri Esprimlibereco de Svedio. Internacia Esperanto-Instituto ĝis nun neniel respondis al demandoj pri la foriro de Atilio Orellana Rojas, sed Libera Folio denove kontaktis IEI-n por peti komentojn pri la novaj asertoj de Atilio Orellana Rojas.

Libera Folio 28-3-2010



PROVERBOJ KAJ DIRAĴOJ KUN BRANĈO, FRUKTO, ARBO, LIGNO

Hakilo estas tranĉa, sed ne cedas la **branĉo**
Pli bona **branĉo** sennuksa, ol kaĝo plej luksa
Se la arbo falis, ĉiu **branĉon** derompas

De semo putra venas **frukto** ne nutra
Frukto malpermesita estas plej bongusta
Laŭ la **frukto** oni arbon ekkonas
Lernado sen **fruktoj** ne restas
Ne falas **frukto** malproksime de l' arbo
Scienco havas semon enuan,
sed **frukton** bonĝuan

Altan **arbron** batas la fulmo
Arbaro aŭdas, kampo vidas
Arbo krakanta venton ne timas
Dancu diabloj, sed ne en mia **arbaro**
El post la **arbo** li estas bravulo
En **arbaro** sidas kaj **arbojn** ne vidas
En landoj transmaraj estas oraj **arbaroj**
Fleksu **arbron** dum ĝia juneco
Kiu timas bestaron, ne iru **arbaron**
Konservas eĉ karbo la strukturon de l' **arbo**
Laŭ la frukto oni **arbron** ekkonas
Laŭdu belecon de l' maro,
sed ĉe rando de **arbaro**

Lupo sopiras, al **arbaro** sin tiras
Ne elvoku lupon el la **arbaro**
Ne falas frukto malproksime de l' **arbo**
Nutru lupon plej sate, li ĉiam serĉas **arbaron**

Pli bona apude najbaro, ol frato post **arbaro**
Pro multo da **arboj** li **arbaron** ne vidas
Se la **arbo** falis, ĉiu branĉon derompas
Sur **arbron** kliniĝintan saltas la kaproj

En fremda okulo ni vidas **ligneron**,
en nia ni trabon ne vidas
Fendita **ligno** facile ekbrulas
Flamiĝema kiel **ligno** rezina
Hakado de **ligno** donas **lignerojn**
Kurba estas la **ligno**, sed rekte ĝi brulas
Li estas flamiĝema kiel rezina **ligno**
Ligno fendita facile flamiĝas
Ne el ĉiu **ligno** oni faras violonon
Trafos hakilo al **ligno** malmola
Vi povas eĉ haki **lignon** sur lia kapo

Rob Keetlaer en proverbaro.net

OOSTENDE FESTAS

Oostende, urbo ĉe la maro, festas la tutan nunan jaron 2010 ĉar ĝi estas kultura urbo 2010 de Flandrio. Sabaton la 3-an de julio 2010, tradicia "Biergustumado kaj gustumado de specialaj bierpladoj" okazos ĉe Sint-Paulusstraat n°78-82. Je tiu okazo la Esperanta klubo de Ostendo "La Konko" prezentos kantojn de la "Regina de la maristokantoj" Lucy Loes, kiu nun estas pli ol 80-jaraĝa kaj ne plu kantas en publiko. Ni invitis ŝin por aŭskulti ŝiajn proprajn kantojn en la ostenda dialekto kaj en Esperanto. Por honoro ŝin ni vere esperas ke ŝi povos veni ĉar nuntempe ŝi estas malsana. En 2006 Lucy Loes estis je la pinto de sia sukceso kaj ŝi multe kantis dum grandaj festoj. Tiam ŝi akceptis ankaŭ kanti en Esperanto, tradukojn de kelkaj kantoj kiujn ŝi brile kantis eĉ plurfojojn en la nacia radio. Alia prezentado estos tiu de "Matondo", multkultura ostenda koruso kiu kantos en pluraj kongaj lingvoj. Estas ĉiam entuziasma etoso kiam la tamtamoj akompas la afrikajn kantojn.. Ili certe kantos la nunfaman "Independance, cha-cha", kanton kreitan en 1959 far Joseph Kabasele por la venonta sendependiĝo de la "Belga Kongo" (30-a junio 1960). Matondo regule animas festojn, geedziĝojn, ekumenajn diservojn, ktp. La publiko estas invitata kunkanti kun la du grupoj. Kantokajeroj estos je dispono. Karaj turistoj, Oostende atendas vin multnombrajn! Amike via,

Flory Witdoeck <flory2@witdoeckt.be>

LEONARDO, LA SENEGALA

Kio estas geniulo? Estas malfacile difini tion, kvankam oni ne havas dubon, vidante verkon de geniulo: ĝi kaŭzas al ni, ordinaraj homoj, perturbajn sentojn, nome miron, admiron, timon kaj eĉ... nekaŝeblan envion. Geniuloj iamaniere minacas nian akomodigemon. Foje estiĝas diskuto pri tio, kiu estis la plej granda geniulo en la historio de la homaro. Listiĝas tuj Einstein (matematiko, fiziko), Ŝekspiro (literaturo), Sokrato (filozofio), Mikelanĝelo (pentroarto, skulptarto), Bach (muziko), Zamenhof (lingvokapablo), Freud (psikologio, literaturo), Pelé (korporlerteco), k.m.a.. Tamen, kape de tiu listo ĉiam staras la figuro de Leonardo da Vinci, pro la frapa kvanto da artoj kaj sciencoj, kiujn li eminente regis: pentrarto, skulptarto, arkitekturo, anatomio, inĝenierarto, matematiko, muziko, biologio, geometrio, astronomio, optiko. Kvankam multaj liaj produktaĵoj perdiĝis, restis ĝis la nuna tempo ĉirkaŭ 6000 paĝoj da manuskriptoj liaj. Li lasis la plej eksterordinaran kolekton da inventaĵoj kaj maŝinoj iam kreitaj de unu sola homo: helikoptero, submarŝipo, paraŝuto, veturiloj, akvoveturiloj, flugmaŝino, turbinoj, teksiloj, kanonoj, pontoj, batalveturiloj, k.a.. **Longan tempon** li praktikadis sekcadon de kadavroj kaj desegnis brilajn anatomiajn bildojn. Leonardo vivis en tempo, kiam la kontakto inter Eŭropo kaj Azio kreskis. Tio stimulis komercon kaj sekve riĉecon. Komercestoj tiam investis je artaĵoj, favorante skulptistojn, pentristojn, muzikistojn, k.s.. Tiaj mecenatoj celis populariĝon kaj ĉefe en Italio (Venecio, Florenco, Ĝenovo) rezultis

17

la plej intensa movado de Renesanco. Karakterizaj de tiu movado estis revalorigo de grekromia kulturo, kvalitoj de inteligento, klereco kaj arttalento, antropocentrismo kaj plivalorigo de racieco kaj naturo. Plej elstaraj reprezentantoj de itala Renesanco estis Mikelanĝelo, Rafael Sanzio, Botticelli, Copernico, Galileo Galilei kaj Leonardo mem. Leonardo naskiĝis en Vinci, vilaĝo proksima al Florenco, en 1452, kaj mortis en Francio, en 1519. Li estis neleĝa ido de notario kaj kamparanino kaj ĉi tiu detalo kaŭzis la kuriozan fakton, ke li neniam ricevis familian nomon. Ankoraŭ tre juna, en Florenco, li fariĝis disĉiplo de la fama artisto Andrea del Verocchio. Liaj unuaj pentraĵoj estis “Sankta Hieronimo” kaj “Adorado de Magoj”, kiujn li ne finis. Cetere, lia laborritmo estis ĉiam tre malrapida, tiel ke ankaŭ pluraj aliaj verkoj restis nefinitaj. Tio ĉi des pli mirigas, se oni konsideras la grandegan kvanton da produktaĵoj, kiujn li lasis. Mezepokaj potenculoj de la familioj Medici kaj Sforza (Ludoviko, Francisko) dungis la geniulon por inĝenieraj kaj militaj laboroj. Rezultis projektoj por militinĝenierarto, hidraŭliko, arto. **Omaĝe** al Francisko Sforza li planis grandan bronzan skulptaĵon, nome “La Grandan Ĉevalon”, kiun tamen li neniam forĝigis. En 1503 li ekverkis la faman “Mona Lisa” kaj preskaŭ samtempe “Leda”; pri ĉi tiu lasta, la sola bildo pri nuda homo inter liaj verkoj, restis nur kopioj. Rilate la privatan vivon de la artisto, tri aferoj vekas atenton: ebla samseksemo, vegetaranismo kaj ateismo. Pro sia kunvivado kun belaj junuloj, kiuj pozis por li, li estis procesita sub

18

akuzo de pederastio – kaj tamen absolvita. Pri viandomanĝado, oni atribuas al li ĉi tiun frazon: “De frua aĝo mi forlasis viandon kaj venos tempo, kiam homoj, kiel mi, konsideros murdado de bestoj same kiel oni nuntempe konsideras murdado de homoj.” Kaj koncerne ateismon, plej miriga estas la aperado de religiaj temoj en liaj pentraĵoj. La plej konata parto el la verkoj de Leonardo estas liaj pentraĵoj. Restis nur 12 el ili - ĉiuj ceteraj perdiĝis aŭ detruigis. Li uzis teknikon, kiu kontrastigis lumon kaj ombron. **Disfumiĝo** de la figuroj kaŭzis apartan efekton kaj same liaj studoj pri anatomio. Plej famaj pentraĵoj estas “La Lasta Manĝo” kaj “Mona Lisa”. La unua estis farita sur muro de manĝejo de monaĥejo Santa Maria delle Grazie, en Milano. La materialo uzita ne estis taŭga, kaj la verko difektiĝis laŭ pasado de la tempo. La tuta bildo impresas pro la esprimpova soleco de Jesuo meze de la apostoloj – kiuj verŝajne simbolas la Zodiakon. “Mona Lisa” estas ankaŭ nomata “La Gioconda”. Ĝi estas eble la plej fama pentraĵo en la tuta Historio. La rideto de la virino estigis nenombreblajn interpretojn. Pri la reala virino, kiu pozis antaŭ Leonardo, oni ne havas pruvojn. Ĝenerale oni supozas, ke ŝi estis edzino de komercisto en Florenco, kiu nomiĝis Francisko Giocondo, probable najbaro de la artisto, kaj mendinto de la portreto. Alia kurioza supozo estas, ke la vizaĝo de “Mona Lisa” estas tiu de Leonardo mem. Kurioze, ke “Mona Lisa” troviĝas nuntempe en Parizo, en Muzeo Louvre, kaj ne en Italio. Historiistoj asertas, ke la artisto verkadis ĝin dum pli ol kvar jaroj kaj

eĉ ne finis ĝin. Fine de sia vivo, pro internaj militoj en sia lando, Leonardo forkuris al Francio, kunportante la tolaĵon. Tie, li eklaboris por Reĝo Francisko la I-a, kiu aĉetis ĝin. Kaj tie ĝi restis.

Alia interesa kaj konata figuro desegnita de Leonardo da Vinci estas la “Vitruvia Homo”. Ĝi estas elpenŝaĵo de la romia arkitekto Marco Vitruvio Poliono (1-a jarcento p.K.), kiu konceptis perfektan homan korpon, surbaze de matematikaj mezuroj. Ĝi baziĝas sur ia dieca proporcio, kiu konsistigas klasikan idealon de beleco. La originala desegnaĵo havas la grandecon de 34 x 24 cm, kaj per du sintenoj lokiĝas interne de kvadrato kaj cirklo. La umbiliko estas la centro. Tuta listo da matematikaj proporcioj estas priskribitaj, ekzemple: la distanco inter la ekstretoj de la manoj (brakoj en horizontala pozicio) egalas la altecon. La intenco de tiu verko, tre karakteriza en Renesanco, estis loki la homon en la centron de la koncepto pri Harmonio en la Naturo. Ĉiu pentraĵo de Leonardo estis submetata de fakuloj al detala interpretado. Li estis ja subtila kaj rafinita pentristo. Li eĉ verkis “Traktaĵon pri Pentrarto”, per kiu li rekomendis, ke Arto servu al Scienco. Sigmund Freud verkis brilan eseon pri Leonardo da Vinci, provante analizi lian personecon laŭ sia analizmaniero: “Leonardo – analizo pri infanaĝa rememoro”. La tuta analizo baziĝis sur sonĝo, kiun la artisto lasis skribita. En la sonĝo aperis birdo, kies nomon oni tradukis al la germana per la vorto “vulturo”. Surbaze de tiu aparta vorto, Freud specife konceptis longan analizadon pri la psiko de Leonardo. Poste,

montriĝis, ke la originalo ne aludas al vulturo, sed al tute alia birdo, kio parte senvalidigis la interpreton. Tradukeraro perfidis do la kreinton de Psikanalizo, kaj Leonardo projekciis al tempo longe posta sian misteron, sian abismecan personecon.

Laste, ni aldonu: Leonardo da Vinci estis malkvieta pensemulo. Longan vicon da pensoj, kvazaŭ iajn


sentencojn aŭ maksimumojn, oni atribuas al li. Tia multtalenta spirito sendube plu mirigas nin, jarcentojn poste. Vidu: “Ekzistas tri specoj de homoj: tiuj, kiuj vidas; tiuj, kiuj vidas, kiam oni montras al ili; kaj tiuj, kiuj ne vidas.” “Simpleco estas maksimuma rafiniteco.” “Nenio trompas nin pli multe ol nia opinio.”

Paulo S. Viana, Rio de Janeiro, Brazilo, INKO,KKE



Bildoj de maraj kaj sovaĝaj bestoj

MICHAEL CWIK



Membro de EBG, elstara eŭropeisto kaj ekonomikisto spertulo pri la lanĉo de la monero Eŭro